


SUDFRANCIA STELO

N° 202 - 3a kvaronjaro 2012 - 3^{er} trimestre 2012



**Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono**



L'histoire a retenu le 26 juillet 1887 comme date officielle de la naissance de l'espéranto. Ce jour-là, en effet, a été publié le premier livre dans cette langue - l'Unua Libro - de Ludwik Lejzer Zamenhof, avec ce titre : « D-ro Esperanto – Internacia Lingvo – Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro (por rusoj) ».



Enhavo:

- P 2 : Federacia kunveno 7/10/2012
- P 6 : Une « semaine Eo » en 2013 ?
- P 10 : Novaĵoj el niaj grupoj
- P 13 : Novaĵoj el Vinilkosmo
- P 15 : L'Espéranto au bac.
- P 16 : Vizito de transalpaj geamikoj
- P 18 : Kelkaj momentoj el...
- P 22 : Mediteranea Esperanto Semajno 2013,
Pech Maho (dua parto)
- P24 : 98-a UK

**Printempa kunveno de la
Federacio : sabaton la 6an de
aprilo 2013 en Béziers
(Maison de la Vie
Associative).**

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE
15, rue du Verdier 34120 TOURBES xianmoure@orange.fr
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono

Federacia kunveno 27/10/2012 en Montferrier

Prezidas Arno Lagrange. Protokolas
Monique Eysseric

1. Bonvenigo, senkulpigoj,
sinprezento .

Senkulpiĝis: JF Pasarella, Serge
Eysseric, ge-Bernard, Hannah
Cayzac

Ĉeestis : Arno Lagrange, Françoise
Harnay, Laurence Esclapez, Marithé
Régueme, Jean-Marie Lot, Jeannine
Bony, Frédéric Bourquin, Christian
Mouré, Hélène Cazejust, Martine
Ragonnet, Véronique Bichon,
Monique Eysseric, Claudine
Coulomb, Josée Boccadifuoco,
Maria Perez y Sanz, Colette
Carbonnel (entute 16).

2. AGADA RAPORTO :

- Nîmes : Frédéric Bourquin
organizis pasintan someron,
ekskurson sur la Susa Kanalo.

Partoprenis esperantistoj el Nîmes
kaj Béziers kaj ne-esperantistoj
aliĝintoj el la Maison de l'Europe de
Nîmes, (kiu miris, ke Esperanto
ankoraŭ vivas !).

- Montpellier : la 1an de oktobro, en
la salono Pétrarque, prelegis Renato
Corsetti, invitita de la Centre
Culturel Esperanto de Montpellier ;
la temo estis : Multaj kulturoj, multaj
lingvoj kaj Esperanto en la estonteco.

Ĉeestis 42 personoj, el kiuj 12 ne
esperantistoj.

La 3an de oktobro, Anna
Lowenstein, ĉe geEysseric, parolis
pri Romo antaŭ 2000 jaroj.

La Foiro de Asocioj allogis multajn
vizitantojn ; rezulto : 3 novaj
gelernantoj.

- Béziers : konstatas, ke
malfeliĉe, la foiro ne venigis novajn
gelernantojn.

- Vojaĝoj en Esperantujo :

- Al UK en Vjetnamio : Martine
el Montpellier kaj Véronique el
Béziers atentigis nin, ke ili prezentos
bildojn pri tiu bela vojaĝo dum la
Zamenhofa tago en Béziers, la 15an
de decembro.

- Diane Richard kaj André
Hoarau partoprenis la Kongreson de
SAT en Jalto.

- La 20a Internacia Esperanto-
Semajno en Katalunio okazis en
Cambrils : Dalia, el Béziers, Serge,
Monique, Martine, Josée, ĉeestis.
Josée prelegis pri hispanaj
memoraĵoj.

- Jorgos organizis renkontiĝon
en Aude, 12-o da gepartoprenantoj el
Tuluzo, Arieĝo kaj Aldeo. Komuna
manĝo kaj kultura programo
(muzikado de Vjera, de Jorgosaj
familianoj, prelego de Zamnehof
laŭtigita de Arno,...)

3. FINANCA RAPORTO

- Ekvilibro de la buĝeto .
- Ĉi jare, malmultaj aliĝintoj al SFS. (La respondeculo, Christian Mouré, plendas, ke la respondeculoj de ĉiuj asocioj ne akurate sendas listojn ; bonvolu sendi la liston antaŭ la 31an de decembro, dankon.) Kosto de la gazeto : papere 8 eŭrojn, rete 2 eŭrojn (fakte senpaga, ĉar la 2 eŭroj estas inkluditaj en la prezo de la aliĝo al la Federacio .)

4. DIVERSAJ PUNKTOJ

- Muzaiko, retradio en E-o temas pri Mojoseco (Moderna Jun' Stila), muziko kaj ĝeneralaj informoj : www.muzaiko.info
- Reprezentanto ĉe E-o France : serĉata reprezentanto de la Federacio Langvedoko-Rusiljono, ĉar Véronique devos lasi la postenon en 2013, laŭ la statutoj . Tiu posteno necesigas du kunvenojn jare en Parizo ; E-o France pagas la duonon de la elspezoj.

- Individua aliĝo al E-o France rajtigas imposterabon je 66%.

- Esperantisto Gijom Harmide prelegas : « Concérences » (concerts-conférences), pere de piano + kantoj ; li registros KD-on. Por helpi lin realigi tiun projekton vizitu la retejon miprovi

<https://sites.google.com/site/miprovir/home>

- Ĝisdatigo de lingvokursoj sur la retejo de E-o France, poste, sendotaj al Katalin Kovats por diskonigi, sur

edukado.net. Ĉiu asocio devus komuniki la tagojn kaj horojn de la kursoj.

- Venontaj kongresoj : IFEF (internaciaj fervojistoj) en Artigues, proksime de Bordojo, de la 4a ĝis la 11a de majo 2013, E-o France okazos en la sama semajno de la 7a ĝis la 11a

- En 2014, kongreso de E-o France kaj eble kun SAT- Amikaro okazos en Hérouville-Saint Clair (Normandie).

- En 2015, UK eble en Lille.

- Serĉataj kunlaborantoj por redakti E-on Aktiv, elektronika letero (oni povas ricevi ĝin papere, se oni aliĝas al E-o France).

- Necesas, ke la Federacio komuniku la adreson de ĉiu responsulo de grupo al la aliaj responsuloj.

- La responsulo de SFS petas, ke oni sendu rapide, raporton pri ĉiuj eventoj.

- Patric, artisto kiun vi eble aŭdis en Sète, registris KD-n en Eo, kiun vi povas antaŭaĉeti ; vidu informan leteron de Vinilkosmo.

<http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/415898> : Preparoj de la albumo « Okcitanio » de Patric – Promeskampanjo de Vinilkosmo

- Grava informo : projekto pri Esperanto- Semajno en Montpellier : de kelkaj monatoj, grupeto zorgas pri la organizado ; la responsulino sendis al la Federacio liston, esperante ke tiu-ĉi aprobu aŭ ne kelkajn punktojn, sed ŝi ne ricevis respondon. Do, la grupeto ne daŭrigis la laboron sen konsento de la Federacio.

Christian sugestis atendi la alvenon de la nova estraro, la 6an de aprilo 2013. Aliflanke, kelkaj el ni preferus, ke tiu evento okazos en 2013, eĉ modeste, dum aliaj preferus atendi 2014 por pli bona realigo.

5. ALIAJ DEMANDOJ

- Semajno de Sète : J.F. Passarella ne plu zorgos pri ĝi. Fakte, li multe laboris ĝis nun !

Kiu anstataŭos lin ? Granda silento ! Monique kaj Josée unue kontaktos la Direktoron de Lazaret pri la kondiĉoj.

J.F. transdonos siajn spertojn al la venontoj.

6. ESTONTAJ FEDERACIAJ, LOKAJ RENDEVUOJ KAJ AGADOJ

- Zamenhofa tago : Montpellier, sabaton la 8an de decembro (Escoutaire).

Béziers, sabaton la 15an de decembro (Maison de la Vie Associative).

- Vizito de Mikaëlo Braunstein en Béziers jaŭdon la 24an de januaro 2013.

- Printempa kunveno de la Federacio : sabaton la 6an de aprilo 2013 en Béziers (Maison de la Vie Associative). Kiu zorgos pri kultura temo ? ... Memoru la belajn prelegojn de Arno !

La tagordo finiĝas, nun, jen LA KULTURA PARTO !

Arno mallonge parolis pri Joachim Faiguet de Villeneuve (citita de Renato Corsetti dum sia prelego en Salono Pétrarque) kiu en la 18a jarcento, interesiĝis al projekto de internacia lingvo ; unu jarcenton antaŭ Zamenhof, li laboris laŭ la sama metodo kaj sama logiko kiel Zamenhof : konjugacio, derivado kaj sufiksado, ... Tiu Joachim partoprenis la redaktadon de la Encyclopédie de Diderot et D'Alembert, do fidinda homo. Ĝis la venonta kunveno, koramike.

Monique kaj Josée.



Mi igis la retejon de la federacio nun redaktebla. Temas pri spipo: se vi deziras kontribui, bonvolu kontakti min kaj mi donos al vi redaktajn rajtojn.
<http://esperanto-languedoc-roussillon.fr>

Momente la retejo entenas jenajn paĝojn, al kiuj povos aldoniĝi ĉiuj necesaj rubrikoj kaj artikoloj :

[Hejmpaĝo](#) > **Mapo de la retejo**

La Federacio

Artikoloj

- [La Fédération Espéranto de Languedoc-Roussillon](#)
- [Sud - Francia Stelo](#)
- [La Federacio Langvedoko-Rusiljono](#)

Niaj kluboj

Artikoloj

- [Kursoj](#)
- [La kluboj](#)

Arno Lagrange

*Elektitaj/élus la 18an de aprilo 2010 en Vergèze
(renovigo/renouvellement en 2013)*

Bichon Véronique

Carbonnel Colette

Mouré Christian « redaktoro/rédacteur » de SFS

(15 rue du Verdier 34120 Tourbes xianmoure@orange.fr)

Passarella J-François prezidanto : président

(10 passage J. Ferry 34290 SERVIAN jf.passarella@free.fr)

Perez y Sanz Maria kasistino/trésorière

(13bis, rue Haute 30310 Vergèze maria.perez@orange.fr)

*Elektitaj/élus la 21an de majo 2011 en Béziers
(renovigo/renouvellement en 2014)*

Bernard Francis, Bernard Monique, Boccadifuoco Josée, Bourquin

Frédéric, Eysseric Serge, Mraihy Zohra

*Elektitaj/élus la 31an de marso 2012 en Nimes
(renovigo/renouvellement en 2015)*

Banaszek Evelyne, Bony Jeannine, Esclapez Laurence, Hénin Jean

Arno Lagrange sekretario/secrétaire:

(arno.raymond.lagrange@gmail.com)

Taupiac Pierre

Une « semaine espéranto » en 2013 ?

En préambule : quel but poursuivons-nous, à qui souhaitons nous nous adresser prioritairement ?

Faire connaître l'espéranto à un plus vaste public ?

Réunir & remotiver les espérantistes isolés ?

Ne pas négliger le fait que faire naître un désir d'espéranto peut générer la nécessité d'assurer des cours....

ières réflexions : Laurence & Véronique (Bzrs), Eveline (Nimes), Andreo, Joelle, Olivier & Martine (Mpl)

❖ OÙ ?

Rapidement unanimité sur 1 seule ville, Montpellier, mais plusieurs lieux & **lien avec le plus possible d'associations partenaires.**

❖ QUAND ?

En lien avec HOLDUB (Le monde à MPL)

Entre mi mars et mi avril (après l'initiative Holdub si possible)

(PB : aujourd'hui ils n'ont pas encore fixé de date, fixer les nôtres sans en tenir compte ?)

(Rappel vacances scolaires : A 20/04-6/05, B 13-24/04, C 27/04-13/05)

En 2013 ou 2014 ?

❖ ANIMATIONS POSSIBLES

Déterminer le nombre & chiffrer globalement ; si 2013, voir celles qui pourraient être organisées le plus « légèrement... »

Tous publics

➤ Eo & monde du travail : table ronde avec syndicalistes, des expériences...

Lieu : maison des syndicats

Avec qui ? : Lien avec Sat Amikaro, Tribolate,...

➤ Eo & voyages : expériences diverses

Lieu : EMLK, médiathèque

Qui : Alice et Cédric (pdt vacances scol.)

Voir si nous pouvons « coller » à une tournée d'espérantistes d'autres pays

➤ Eo & linguistique, traductions...

Lieu : Université P. Valery

Qui : A. Cherpillod ? Aussi évoqués : D. Moiran, R. Betto

➤ Eo & actions solidaires

Lieu : EMLK

Qui : Arrout : école Afrique & apprentissage Eo , autres expériences (Evelyne), au Burundi, au Tchad (avec des correspondants eo, expl : mireille Grosjean)

➤ Eo : comment ça vit...

Lieu : ...

Qui : des expériences, mais là, on a un peu séché ! Les pistes : Flo & la musique, Toulouse,...

➤ Concert (est ce que ce serait trop cher ? quelle finalité ?)

Lieu : Kiosque Bosc

Qui : Jomo & Patric

➤ Film

Lieu : Médiathèque Fellini, cinéma Utopia

Qui : Sam Green ou (& ?)
Dominique Gauthier (aura-t-il
terminé le ss titrage ?)

➤ Exposition

Lieu : Médiathèque(s), Maison des
relations internationales,...

Quoi : expo UFE

Comment : Expo avec animations
ponctuelles, initiation, jeux

Pour les plus jeunes

➤ Conte

Lieu : médiathèques, Centres de
loisirs, école,...

Qui : Vjera

Dans tous les lieux : livres &
disques, docs

❖ Questions à suivre

➤ Finances : des subventions ?

➤ Logistique : qui pourra
héberger ?

➤ Com : radio, presse, relais
associatifs.

Martine Ragonnet

* * * * *

Je vais reformuler et développer ce
que j'ai exprimé au cours de la
dernière réunion.

L'objectif d'une "semaine de
l'espéranto" est de concentrer
l'attention du public.

Un tel projet est d'autant plus
efficace qu'il se répète (1 ou 2 fois
par an)

A la réunion du printemps nous
avons parlé d'une semaine à
l'automne (autour de la venue de
Corsetti et Löwenstein) et d'une
semaine au printemps (en lien avec
"Montpellier international")

Le groupe qui a travaillé avec
Martine a mis en perspective neuf
actions possibles. Au cours de la
dernière réunion Martine a souligné
que faute de réaction (donc de
soutien) de la part de la Fédération le
groupe de travail pensait repousser à
2014 la concrétisation de ce projet.
Je propose donc que le groupe se
remette au travail en sélectionnant 2
à 4 (ou plus) des actions envisagées
qui semblent les plus réalisables et

les plus intéressantes quant à l'impact
qu'on peut en attendre et fasse en
sorte qu'elles aient lieu au printemps
2013.

Je suggère : Eo & action solidaire,
Concert, Film, conte, expo, chacun
de ces éléments pouvant n'être pas
trop lourd à organiser et formant un
ensemble sur lequel on peut
"communiquer". Pour le "concert" je
recommande Guillaume Armide avec
sa concérence "Les cinq bons sens de
l'espéranto"

[https://sites.google.com/site/5bonsse
nsdelesperanto/](https://sites.google.com/site/5bonsse
nsdelesperanto/)

La manifestation "Montpellier
international" semblant trop floue
(date non encore connue à ce jour),
notre initiative ne doit pas en
dépendre: donc déterminer nous
mêmes les dates.

Ce qui est primordial ce sont les
contacts pris auparavant avec des
organismes partenaires susceptibles
de participer aux événements
proposés et avec les médias qui
pourront relayer l'information.

Le groupe de travail présentera un budget prévisionnel de la manifestation au bureau qui devrait l'approuver dès lors que les éléments sont justifiés (ex: frais pour faire intervenir un artiste dont on attend un impact positif). La recherche et l'obtention de financements autres (subventions, prise de participation d'une MJC, d'un centre culturel, etc.) est bienvenue.

Une semaine réussie (même modeste) en 2013 sera un bon point de départ pour un projet plus ambitieux pour 2014. Au contraire reculer aujourd'hui toute concrétisation à 2014 c'est prendre le risque d'un enlisement du projet sans l'assurance d'un plus grand succès. Voilà mon point de vue: je vous le soumets comme base de discussion pour des décisions que nous prendrons ensemble.

Arno.

* * * * *

Avis personnel!

1) les ressources humaines: qui participe le jour de la réalisation, combien de personnes. Pour avoir été par intermittence à la prépa de l'irem de Sète, j'ai vu tout le travail en amont...)

2) le projet : 2013 court; une soirée cinéma avec éventuellement discussion sur ou pour l'espéranto. (avec les panneaux de l'exposition dans le hall par exemple). ce petit projet peut ainsi être autonome.

3) un projet (pourquoi et rôle de l'espéranto) à raccrocher à une grande manifestation. Laquelle? Je ne sais pas.

Avantage: le public est là, et on participe à la fête!

Pour 2013 cela me semble déjà pas mal, surtout que la 'com' prend du temps et les journalistes aiment bien les textes tout fait!

Il y a aussi les radios régionales, mais bon

Le bilan permettrait de voir si c'était bon / pas bon, et d'ajuster le 'volume' pour 2014.

4) Pour " Patric" essayer de voir avec qui s'associer; occitanistes ou autres (ne placer que quelques chansons en Espéranto dans sa soirée).

Nous ne sommes pas nombreux, inutiles de dilapider les ressources juste pour faire un truc.

Il faut se fixer un objectif de rentabilité (30 espérantistes de plus?)

Christian

* * * * *

Personnellement, je suis d'avis qu'il vaut mieux faire peu que trop.

On peut donc préparer quelque chose pour 2013, une journée par exemple, bon ce n'est que mon avis.

Par ailleurs, ce que disent Arnaud et Christian me paraît très sensé.

1/ PROPOSITION DE REUNION

Le mieux est que notre groupe de travail de la Semaine de l'Espéranto se réunisse à nouveau afin de poser le ou les évènements.

(Ce GT pourrait se réunir pour tout e qui concerne des actions et pas seulement la Semaine de l'Espéranto.)

Donc ceci est une PROPOSITION DE REUNION pour celles et ceux que ça intéresse.

Quand peut-elle avoir lieu??

2/ POUR LE PROCHAIN KUNVENO

De plus, la position de ce groupe de travail devrait selon moi être définie par rapport au CCEM et à la Fédération.

Le groupe de travail serait mandaté (ou quelque chose comme ça), par ex.il rendrait des comptes au CCEM ou a la Fédération, techniquement : je pense au "mandat impératif". Je propose d'inscrire plus précisément à l'ordre du jour du prochain kunveno :

"la relation entre le groupe de travail et le CCEM":

Par exemple :

- le GT est autonome dans ses décisions
- le GT respecte des directives préalablement définies par le CCEM
- le GT rend des comptes au CCEM sur l'avancement de ses travaux
- le CCEM peut annuler (sur décision collective) quand il le veut le mandat du GT
- le CCEM est prêt à financer le projet du GT dans une limite raisonnable.

Définir un cadre permet d'avancer. Accessoirement, pour Le Monde A Montpellier 2013, il serait chouette qu'on ait un groupe de musiciens.

3/ DIVERS

Il serait intéressant pour le GT d'avoir une copie des statuts du CCEM si ce n'est le cas.

Amicalement

Olivarbo

vizitu kaj tuj aldonu en viajn preferatojn :

<https://sites.google.com/site/ccemontpellier/home>

* * * * *

Bonvolu helpi la projekton ! Sendu viajn ideojn, kaj ĉefe vian partoprenon !

* * * * *

NOVAĴOJ EL NIAJ GRUPOJ

La Lozère n'est pas en reste !
Soirée au Caylar avec JoMo,
vendredi 27 juillet 2012. Il était venu
quatre espérantistes dont trois de
Lozère ! Environ 180 personnes ont
écouté JoMo durant une heure (au



DE KVINPETALO en BOURESSE

Ĉi jare denove ni ĉeestis en tiu
vilaĝo por kuiri, aŭskulti kaj paroli
Esperanton kaj aŭdi aŭ ludi muzikon.
Sur la kampoj la rikoltmaŝinoj zumis
kaj la polvo ĉirkaŭ ili flugis al la blua
ĉielo. Blekantaj ŝafoj kaj bovinoj
paŝtis sur la herbejoj. Kiom multaj
aktivaĵoj somere sur la kamparo !
En la centro Kvinpetalo, ankoraŭ ĉiu
staĝanto aktiviĝis. Kiam ni estis
liberaj ni kuniĝis kun ili.
Lino Markov verkis diversajn
muzikaĵojn sur originalaj esperantaj

lieu de trois heures car un orage a
interrompu le concert en plein air !)
Il a fait une bonne présentation
de l'espéranto tout en chantant dans
différentes langues. Il est
toujours très captivant, très agréable
à entendre.

Un stand espéranto a été tenu à la
Fête des Travailleurs les 25 et 26
août. Nous sommes intervenus au
cours de la discussion politique.
Nous avons eu une dizaine de
signatures et un abonnement à
ESPERANTO-info.

Samedi 8 septembre, au forum des
associations de Florac, nous avons eu
cinq nouveaux à notre club
d'espéranto.

Et la radio locale a interrogé
Monique pour une minute 30s.

Les cours se feront tous les mercredis
de 16h à 20h à Florac.

Amike Francis

* * * * *

poemoj : Ekz : Hejmo de Marjorie
Boulton (G.B.) aŭ Vintra Nokto de
Dimitro Zlartarskli (Bg).

Ni malkovris la verkaĵojn de
M.Boulton kaj parolis pri la rilatoj
inter muziko kaj tekstoj.

Dum la libera tago ni vizitis la novan
prahistorian muzeon de Lussac les
Châteaux, kie staras grotoj de la
praavoj ĉirkaŭ ĝia lageto. Tiu muzeo
estas riĉa pro iliaj gravuritaj
moveblaj ŝtonoj.

Antaŭe en 2007 ni rakontis al la
staĝantoj la eventojn de 1907 en
Langvedoko-Rusiljono. Tial ili aŭdis

la kanton pri la soldatoj. Ĉi jare ni kantis la tradukon de tiu kanto. Kiel kutime la vilaĝanoj ĉeestis nian finstaĝan koncerton kaj povis kanti popolajn kantojn.

1-Legitima ja via kolero
La rifuzo estas ĉefa devo.
Kiu rajtas buĉi la gepatrojn,
Serve al la eminentularo ?
Soldatoj, via konscio klaras.
Ni ne buĉigu inter Francoj ;
Rifuzante uzi bajonetojn
Karaj soldatoj, vi bonege agis !

2-Kiel ĉiuj vi Francion amas
Tute certe, eĉ vi ŝatas ĝin.
Sed sub via militpantalono
Vi ja restis ankaŭ civitanoj.
La patrio estas unue panjo,
Tiu kiu mamnutris vin.
Kaj prefere iri al karcero
Ol fariĝi de ĝi murdanto.



Jen la kanto de la soldatoj de la 17a :
Gloron al la 17a :

R- Gratulon do al vi,
Bravaj soldatoj de l' 17a
Gratulon karuletoj,
Ni vin admiras kaj amegas ;
Gratulon do al vi,
Por tiu kuraĝega gesto.
Se kuglojn vi pafus al ni
Vi ankaŭ murdus la respublikon.

3- Ni esperu, ke iam en Francio
Regos paco kaj interkonsento.
Flegu ni la belan esperon
Ke baldaŭ ja venos tia tago.
Semis vi la unuajn grenojn,
En la sulkoj de l' homaro.
La rikolto baldaŭ maturiĝos
Kaj tiam ni festos vian geston.
Genevieve kaj Line.



* * * * *

Promenado de la C.B.E. en Puissalicon

La 24^{an} de oktobro, suno brilegis, bela tago por sep membroj de C.B.E.

kaj Jean-Marie, kaj ankoraŭ Berlioz la hundeto de Marie-Thérèse, kiuj rendezvous en la enirejo de

Puissalicon, vilaĝo proksime de Béziers (15 km.)

Geneviève organizis kaj gvidis la malkovron de tiu cirkla vilaĝo konstruita dum la mezepoko, ĉirkaŭ la kastelo kaj la preĝejo.

Mezepokaj, la kastelo kaj la preĝejo staras sur monteto, sed la loĝantoj vivas inter la kastelo kaj la rivero. Militoj detruis konstruaĵojn, muregojn, nur restas la preĝejturo. Oni konstruis domojn laŭ rondaj stratoj.

Unue ni vizitis la preĝejon kaj la kapelon de S^a Guiraud. Tiu sanktulo estis dum du jaroj episkopo de Béziers. Oni festas lin unu fojon jare per granda manifestacio. Oni povas eniri nek en la kastelon nek en la detruitan episkopan palacon.

Ni atingis tra tre puraj stratoj oldan « Pardon de Pradelles ». Afabla virino montris al ni en niĉo statueton de la Sankta Virgulino tenante sian filon. Ni revenis ĝis la piknika areo, kie ni manĝis kukojn, trinkis akvon

kaj bonegan brazilan kafon alportita de Dalia.

Poste, tra agrabla vojo, ni marŝis ĝis la tombejo dispartigita en tri partoj. La malnova entenas belan lombardan turon, la plej mirinda en la regiono. La du aliaj lokoj konsistas en aleo kaj pinarbareto. Ni grimpis poste ĝis la ne tro alta supro de la monteto « Puech aŭ Pech aŭ Pioch de Biau » (okcitanaj vortoj). Ni admiris la pejzaĝon, vasta ebenaĵo de vinberujoj kaj vilaĝoj. Finfine ni veturis ĝis Béziers.

Ni dankis Geneviève por tiu tre agrabla posttagmezo. Ni ne estis lacaj ĉar ni promenis malrapide tamen Marie-Thérèse je la fino brake portis Berlioz.

Ni demandis al Geneviève « kiam kaj kie vi kondukos nin en alia loko ? »

Ŝi ne respondis sed ni certas, ke ni reiros promeni ĉar ni vivas en interesa, turista regiono.

Cercle Biterrois d'Espéranto

CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

Bonan tagon ! Ĉu vi bone fartas ?

Post iomete da tempo, ni nin revidos. Jen la datoj de la kunvenoj, pri la tuta jaro 2012-2013 : ĉiam la sabato, de la 10-a ĝis la 12-a, renkonto por transdoni novaĵojn, k.t.p, de la 12-a ĝis la 14-a, gaja tagmanĝo en kie oni trovas ĉion...kion oni kunportas.


8-an de decembro (Zamenhofa Tago), 19-an de januaro 2013, 16-an de februaro, 16-an de marto, 13-an de aprilo, 18-an de majo, 15-an de junio.

Do, prenu viajn tondilojn, iomete da gluo kaj gluu tiun kalendareton en via...cerbo. Ĝis la revido. Kore, la sekretariino, Monique Eysseric



Artiste unique, Patric est un des plus célèbres interprètes en langue d'Oc, avec un répertoire mêlant les chants populaires occitans, les adaptations de succès étrangers, et ses propres compositions. A ses débuts, il a chanté avec Brassens, Barbara, Mouloudji, Nougaro, Duteil, Raimon, Lluís Llach, Pi de la Serra, et Tom Paxton l'a reconnu comme digne héritier des protest-singers américains


Depuis le Congrès Mondial d'Espéranto de Montpellier en 1998, Patric a séduit le public espérantophone, et de nouveau à l'occasion du Congrès National d'Espéranto (IREM) de Sète en 2011. A l'issue de ce congrès naquit l'idée du projet d'un album en espéranto, utilisant des chansons de Patric traduites en espéranto par André Andrieu, adaptées par Ludmila Novikova, et publiées en Russie dans une brochure intitulée "Okcitanaj kantoj en esperanto" (Chansons occitanes en espéranto). Le présent album, "Okcitanio" (Occitanie) tire de ce recueil de chansons déjà parues dans les albums de Patric en occitan, quinze titres venant du répertoire populaire et traditionnel occitan, et des compositions de Patric. Le projet a été réalisé sous la direction artistique de JoMo (Jean-Marc Leclercq).



Les chœurs ont été enregistrés par un groupe choral constitué d'espérantophones de Toulouse et d'Ariège, enregistré, mixé et masterisé par Triboulet au Studio de la Trappe/Vinilkosmo pour être produit par Vinilkosmo, bien sûr !

Patric est un troubadour moderne qui sillonne le monde entier avec ses chansons. Il fêtera pas moins de 40 ans de carrière en 2013 avec 18 albums à son actif, 2 DVD, et un livre de souvenirs et réflexions, et partage aujourd'hui ses chansons où sont mêlés tradition, sentiments personnels, couleurs, sonorités et ambiances d'Occitanie, avec le monde entier à travers la langue universelle.





Unika artisto, Patric estas unu el la plej famaj okcitanlingvaj kantistoj, kun kantaro kiu miksas popularajn okcitanajn kantojn kun adaptaĵoj de eksterlandaj sukcesaĵoj, kaj liaj propraj komponaĵoj. Komence de sia kariero, li kantis kun Georges Brassens, Barbara, Mouloudji, Claude Nougaro, Yves Duteil, Raimon, Lluís Llach, Pi de la Serra. Kaj Tom Paxton rekonis lin digna heredanto de la usonaj protestkantistoj.

En la UK en Montpellier en 1998, Patric allogis la esperantistan publikon, kaj plian fojon okaze de la Franca Nacia Kongreso (IREM) en Sète en 2011. Post tiu kongreso naskiĝis la ideo pri albumo en esperanto uzante la kantojn de Patric tradukitajn en esperanton de André Andrieu, adaptitajn de Ludmila Novikova, kaj eldonitajn en Rusio en broŝuro titolita Okcitanaj kantoj en esperanto.

La albumo Okcitanio kolektas dek kvin titolojn el la kantaro de Patric aperintajn en liaj okcitanaj albumoj; temas pri populara kaj tradicia okcitanana repertuaro kaj ankaŭ propraj komponaĵoj.

Li akompanas sin per ĉiuoriginaj altkvalitaj muzikistoj en ĵazo, tradicia, roko, romaa, populara, salsa, mondmuziko, ktp. La projekto efektiviĝis laŭ la arta direktado de JoMo (Jean-Marc Leclercq). La korusaĵoj estis registritaj de korusa grupo de geesperantistoj el Tuluzo kaj Arieĝo. Inter la elektitaj kantoj: la famega "Se canta" (Se ĝi kantas) kara al okcitanoj, kaj "Kastelorizo", kanto dediĉita al lia forpasinta avino kiu estis grekino, precize de tiu eta greka insulo Kastellórizo.

Okcitanana kantisto Patric estas moderna trobadoro kiu vojaĝas tra la tuta mondo kun siaj kantoj. En 2013 li festos kvardek jarojn de kariero, sursceneja kaj diskara, kun jam dek ok albumoj, du DVD, kaj libro pri memoraĵoj kaj pensaĵoj. Hodiaŭ estas la vico de esperanto per la apero de albumo Okcitanio interpretita de Patric en la universala lingvo. La albumo estas invito vojaĝi en Okcitanio, kaj komenciĝas en la Suda Stacio, kie oni povas aŭdi la mediteraneajn lingvojn (italan, hispanan, okcitanan) en la rekantaĵoj. Dek kvin kantoj kie miksiĝas tradiciaĵoj, personaj sentoj, koloroj, sonoj, kaj etosoj de Okcitanio

Flo Martorell ricevis la ĉi jaran FAME-premion (3.000 eur)!

En 1988 Alois Meiners starigis la fondaĵon FAME por subteni la Esperantan kulturon, enkadre de kiu ĝi aljuĝas "Kultur-premion FAME" kun aldonita sumo de 3000 eŭroj - la plej alta premio-sumo en la Esperanta-mondo.

La ĉi-jaran premion ricevis Floréal Martorell, por siaj meritoj rilate al Esperanta muzika kulturo! La transdona ceremonio okazis en la urbo Aalen, en kadro de solena festo kun subteno de la urba administracio.

La festprelegon faris konata germana esperantisto, eksperto-muzikisto Gunnar Fischer.

Sincerajn gratulojn al Floréal Martorell, kaj al la tuta teamo de la Esperanto-eldonejo Vinilkosmo pro la premio!

- <http://www.vinilkosmo-mp3.com/index.php?language=e>

- retejo de Vinilkosmo

- <http://www.fame-stiftung.de/eo/kulturpremio.html>

- retejo de fondaĵo FAME

Szilvási László fonto: Ret-Info
<http://www.eventoj.hu>

* * * * *

www.esperanto-au-bac.fr



CAMPAGNE ORGANISÉE PAR
ESPÉRANTO-FRANCE ET SAT-AMIKARO
PARRAINÉE PAR ALBERT JACQUARD

Alors qu'elle touche à sa fin, la campagne pour l'esperanto au bac vient d'atteindre le cap des 30 000 signatures.

Fin de campagne

Aujourd'hui il est important que chacun et chacune renvoie les signatures recueillies sur format papier très rapidement pour qu'elles soient comptabilisées. (feuille de pétition : <http://esperanto-au-bac.fr/squelettes/telechargement/feuille.pdf>)

Renvoyez vos signatures à
*Campagne esperanto au bac - 17,
Rue du Cambeilhou - 64400 Oloron
Sainte-Marie*

N'en doutons pas, il reste des personnes ou des associations qui ont des feuilles avec des signatures qui n'ont pas été centralisées et donc comptabilisées.

N'hésitez pas non plus à envoyer un courriel à vos connaissances pour des dernières signatures "sur le fil" :
<http://esperanto-au-bac.fr/>

Un dernier effort pour porter au plus haut notre compteur des signatures !

Premier bilan

Cette campagne aura beaucoup mobilisé, preuve en est les milliers de signatures collectées. Elle aura contribué à faire connaître l'espéranto.

Il faut noter aussi le nombre important de personnalités signataires, notamment en terme d'élus. [Allez consulter la "seconde liste" complétée durant la campagne : elle parle d'elle même.](#)

Et maintenant...

Nous allons maintenant présenter publiquement et remettre les signatures. Nous allons d'abord

informer chaque parlementaire par courrier du résultat de notre collecte et demander à ceux qui le veulent de soutenir notre demande auprès du ministère.

Par la suite, nous allons présenter à la presse notre bilan. Que chaque association locale n'hésite pas à mettre en place sa propre conférence de presse pour la presse locale et régionale.

Enfin, un rendez-vous sera demandé au ministère de l'éducation nationale pour remettre les signatures et présenter notre demande.

Editeur : [Campagne pour l'option espéranto au bac](#)
<http://esperanto-au-bac.fr>

* * * * *

VIZITO DE TRANSALPAJ GEAMIKOJ

AL CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

Ĉiun duan jaron, la Esperanta Asocio de Montpellier, gastigas esperantan eksterlandanon. U.E.A. organizas rondirojn en diversaj francaj regionoj. Ĉi jare, Anna Lowenstein kaj Renato Corsetti vizitis Sudorientan parton de Francio. Post Grenoble, Lyon, La Ciotat kaj aliaj, ni atendis ilin, la 30an de septembro. Kiel kutime ilin gastigis Serge kaj Monique.

Tiun dimanĉon 30an de septembro, je la 17a, kun Jeannine, Andreo kaj Diane, ni sidis en kafejo, Placo Jean Jaurès, kien ni rendevuis kun Serge, Monique kaj iliaj gastoj.

Tie ni interkonatiĝis kaj babilis, la vetero estis agrable varmeta. Poste tiuj, kiuj intencis paŝi, promenadis en la urbo.

La morgaŭan matenon, nur Jeannine akompanis ilin 4 por duontaga ekskurso, ili vizitis 'Pont du Gard' kaj rondiris en la urbo Nîmes. Tiu ekskurso ŝajne multe plaĉis al Anna kaj ankaŭ al Renato. Iom da ripozo poste, ĝis la prelego en Salle Pétrarque, kie 43 partoprenantoj ĉeestis. Inter ili 11 neesperantistoj, el kiuj pluraj eklernos Esperanton !

La prelego estis interesa, la titolo estis : 'Multaj kulturoj, multaj Lingvoj kaj Esperanto en nia

estonteco'; du el niaj amikoj tradukis ekstemporale kaj tre atentemaj ĉiuj



estis. Tuj post la parolado, al kelkaj demandoj Renato respondis kaj estis pli mal pli la 20a kiam ĉiuj eliris.

Ni estis 11 kiuj paŝis ĝis la Placo Jean Jaures, en eta restoracio por manĝi antaŭ ol ĉiu reiros hejmen. Feliĉe ke ĉiuj elektis nur salaton por pli rapide manĝi, se ne, ni ankoraŭ estus en tiu loko! Ni atendis unu horon kaj duonon, por havi antaŭ ni, grandan teleron kun : salato... Vere, se ne estus niaj italaj geamikoj, mi forirus antaŭ ol oni servu nin ! Kaj eble ankaŭ aliaj farus same! Feliĉe, la esperantistoj estas ĝentilaj homoj, kaj ĉio bone disvolviĝis !

Mardon estis antaŭvidita tuttaga ekskurso, sed Anna kaj Renato certe ŝatis ripozi la matenon kaj nur post tagmanĝo, la samaj 5 geamikoj vizitis Seto-n, kaj la abatejon de Maguelone.

Post tiu longa rondirado, certe iom da ripozo estis bonvena por ili.

Do merkredon matene, je la 10a, 17 geamikoj instaliĝis en la salono de Serge kaj Monique por aŭskulti la prelegon de Anna : 'Romo antaŭ 2000

jaroj'. Eĉ se ni estis malmultaj, la temo, kun video-bildoj, tre interesis nin.

Mi ege dankas Francis kaj Monique Bernard, ke ili kunveturigis Gilbert kaj Marite, kiujn ni ne vidis de longa tempo.

Kiel kutime, ĉiu kunportis : aŭ salaton, aŭ torton, aŭ fromaĝon, aŭ deserton, Serge kaj Monique preparis la ĉefan pladon kaj la babiladoj ne ĉesis antaŭ la 15a, kiam Renato diris, ke bedaŭrinde, ili devas foriri por atingi la italan landlimon antaŭ la nokto.



Do, post duon-horo, kiel flugantaro, ĉiuj foriris : al Béziers, Campagnan, Ste Eminie, Montpellier, La Paillade, Lattes.

Kaj jen belaj bildoj restos al ni en nia memoro, por atendi (kial ne ?) alian viziton de eksterlandano ? Ankoraŭ dankon al Anna kaj Renato! J.B.

Kelkaj momentoj el la vivo de Dolores kaj Vicente-Ramon

En la jaro 1926, Dolores kaj Vicente-Ramon, geedziĝis en hispana urbeto : Burriana.

En la urbo, multajn klaĉojn oni aŭdis, estis la unua CIVILA geedziĝo, Vicente-Ramon tute rifuzis enriri preĝejon, eĉ por edziĝi.

En tiu kampara urbeto, ĉirkaŭita de oranĝarbaroj, ili laboris en grandaj magazenoj "almacenes", kie la viroj fabrikis latkestojn por la oranĝoj. En la samaj "almacenes", la virinoj, antaŭ rultapiŝoj, prenis la oranĝojn jam kalibritajn, envolvis ilin per silka-papero, kaj bele aranĝis ilin en la kestojn.

La paro novelziĝinta, havis multajn geamikojn, kiuj laboris kun ili aŭ ne, sed ĉiujn finsemajnojn, post vespermanĝo, ili kuniĝis por babili, danci kaj "refari la mondon".

Post unu aŭ du jaroj, Dolores naskis filineton, kiu bedaŭrinde mortis post kelkaj monatoj. En tiu epoko, ofte okazis, ke beboj mortis, oni ne sciis pro kio.

Oni povas imagi, la TRISTECON de tiu juna patrino. Ŝi estis nekonsolebla ! Certe sama nekonsolebla sento traboris la koron de Vicente-Ramon tre sentema viro.

Eble pro tio, Vicente-Ramon kun la geamikoj, komencis paroli, pri la ebleco viziti Francion, dum somero.

Ili konis burriananojn kiuj foriris antaŭ kelkaj jaroj kaj restis en Sete (haveno ĉe Mediteraneo, kie la oranĝkulturistoj de Burriana, boate negociis kun entreprenoj de Sete), do

ili skribis por havi klarigojn pri la ebleco labori en tiu regiono, nur por iom da tempo.

La korespondado, daŭris plurajn monatojn ; nun, ni malfacile imagas tian longan korespondadon, nur kelkaj minutoj sufiĉas por paroli al iu en la alia flanko de la tero !

Sufiĉas diri, ke tiuj konatuloj, kontaktis bien-posedantojn en vilaĝeto apud Sete kaj en oktobro 1929, 6 aŭ 7 paroj de novelziĝintoj, entrajniĝis en Burriana kaj alvenis en Cournonterral, vilaĝeto je 15 kilometroj de Montpellier kaj 20 kilometroj de Sete, por vinberrikolti.

La laboro estis facila por gejunuloj, do ili estis feliĉaj, kiam je la fino de tiu laboro, la majstroj proponis al pluraj el ili, ĉu ili dezirus resti labori en la vinberejoj, nur du paroj reiris al Hispanio.

Vicente-Ramon, estis dungito por prizorgi dum la tuta jaro, sufiĉe ampleksan vitejon. La salajro estis pli taŭga ol en Hispanio, despli, ke Dolores estis ankaŭ dungita por mastrumi ĉiutage ĉe la majstrino. Por plibonigi la aferon, ili instaligis en senpaga dometo apartenanta al la majstroj.

Do, la tagoj, la semajnoj, la jaroj, feliĉe pasis, en tiu vilaĝeto, kie ĉiuj komprenis la valencian lingvon, kiu multe similis la dialekton, de ĉi tie. Alkutimiĝi al tiu nova vivo ne bezonante lerni novan lingvon, imagu kian feliĉon !!

En la jaro 1933, belan filineton Berthe, naskis Dolores, por ŝi estis grandega feliĉo, kiu certe mildigis la aflikton kiu tamen restis ĉiam en sia koro ! La gemajstroj, ne havante infanojn, estis la feliĉaj gebaptopatroj de tiu knabineto, kiu iĝis pli kaj pli amata, pro sia afableco, ĝentileco.

Sed, kiam la enlanda milito komenciĝis en Hispanio, Dolores kaj Vicente-Ramon, bedaŭris esti for de sia naskiĝlando, en tiu momento, kiam temis pri doni kaj konservi respublikan statuton al Hispanio ! Plie, familioj, amikoj, baldaŭ, ne plu donis novaĵojn, nek la frato de Dolores, kiu estis la unua respublika urbestro de Villareal, nek la geamikoj kiuj reiris Hispanion. Nur multajn jarojn poste, interrilatiĝoj kun la familianoj rekomencis. Ekde 1936, Dolores kaj Vicente-Ramon, sekvis la eventojn dank'al du hispanaj gazetoj, kiujn ili regule ricevis (kial ? mi tute ne scias) ili estis : la CNT kaj alia gazeto, kies titolon mi forgesis. Ili proponis helpon al la respublikaj aŭtoritatoj de tiu epoko, tial, ili gastigis knabineton 6-jaraĝa, kies familio malaperis dum la bombardado de iu norda urbo (eble Bilbao ?).

Kiam tiu knabineto, Jozefino alvenis en Cournonterral, en la dometo kiu akceptis ŝin, jam estis Berthe 3 jaraĝa kaj Fifi, nur kelkajn monatojn. Jen do familio, kiu rapide kreskis en malmulte da tempo. Dum pluraj jaroj, la familia etoso, varmiĝis pli kaj pli, kune kun junegaj

hispanoj, kiuj fuĝis la enlandan militon. En tiu dometo, ĉeestis dum pluraj semajnoj, foje monatoj : Antonio, Miguel, Gregorio, ĝis ili trovis rifuĝejon pli sekura.

Iun tagon de 1940, ordono de hispanaj aŭtoritatoj insiste petis, ke la knabino Jozefino reiru al Hispanio, kie ŝia familio reaperis. Dolores kaj Vicente-Ramon, devis obei, ĉar en la sama tempo, la dua mondmilito komenciĝis en Francio kaj por la hispanoj pli bone ne esti rimarkitaj. Tamen, la reapero de la familio de Jozefino estis ĉiam mistero, oni plu nenion sciis pri ŝi, ĉu vere aŭ ne, la gepatroj reaperis ?

En la sama jaro, eble iom antaŭ tiu evento, aŭ samtempe, Berthe malsaniĝis kaj en la daŭro de unu monato, ŝi mortis pro infekto de la renoj ; bedaŭrinde, la antibiotikoj, aperis en Francio nur post la milito. Preskaŭ samtempe, iun nokton, Vicente-Ramon vekis Fifi-n, kiu dormis en sia liteto kaj brakumante ŝin, li diris : "Paĉjo devas foriri iom da tempo, vi restos sola kun Panjo, vi estos bona knabino, obeu ŝin, ĉu ? baldaŭ mi revenos ". Fakte, li devis foriri el la domo, por sinkaŝi en arbaroj " La Boissière " kune kun Makisanoj kaj aliaj hispanoj, ili restis tie ĝis la LIBERIGO en 1945.

Do, jen dometo, kiu en la daŭro de kelkaj monatoj, de plenplena, iĝis, nur kun juna virino kies koro ploris ŝian filineton Berthe kaj knabineto, kiu sindemandis kien foriris ŝiaj amataj familianoj ?

Eble tio ne sufiĉis, Dolores kaj Fifi, devis transloĝiĝi, por lasi la dometon al novaj dungitoj.

La nova domo, en la alia parto de la vilaĝo, estis pli ampleksa ol la alia, granda korto permesis ludi kaj bicikli, tio multe plaĉis al tiu kompatinda knabineto. La domposedantoj de tiu dometo, loĝis en la sama korto, en belega domo: temis pri pensiuloj, ŝi eksinstruistino, li eksadvokato.

Tiuj du maljunuloj, forte impresis la knabineton; ĉiun post-tagmanĝon, ŝi estis invitita viziti la gesinjorojn, dum Dolores mastrumis plurajn domojn en la vilaĝo.

En la komenco, la sinjorino, plibonigis la legadon de Fifi, de tiam, legi iĝis por ŝi vera pasio, despli, ke tie estis granda biblioteko je ŝia dispono, kie ŝi povis legi infanlibrojn; de tiam, ŝi neniam enuis. Je la 16a horo, alloga manĝeto atendis ŝin en la kuirejo, poste kun la sinjoro ŝi lernis ludi DAMOJN kaj aliajn infanajn ludojn. Tiuj momentoj repacigis la knabineton kun la vivo.

Dume, en la Makiso, la proviantado estis pli facila ol en la vilaĝoj, dank'al multaj ŝafistoj, kiuj paŝtigis ŝafarojn en la Garigo.

Foje, Vicente metis donatan ŝafon, sur la pakportilon de sia biciklo kaj nokte sen lumo, biciklis ĉirkaŭ 50 kilometrojn (ire kaj reen), ĝis sia hejmo; li faris tion kun alia amiko, kiu ankaŭ vizitis sian familion; plurfoje, ili devis sin ĵeti en fosaĵojn stratrande, pro germanaj patroloj. Vane diri, kiel bonvena estis tiu

ŝafo! Sed kiel mortigi ĝin, sen materialo? Nur restis la solvo uzi fajrostangon! Kompatinda ŝafo!! Tamen ĝi estis bonvena en tiu tempo de ĉio-manko! Ĝi estis partigita inter pluraj familioj, plie, parto servis kiel var-interŝanĝo. Oni longe parolis pri la mortita ŝafo.

Alian fojon, oni (kiu oni? la arab-telefono bone funkciis en tiu tempo), do oni avertis Dolores pri juna rifuĝinto "kiu restis kelkan tempon en la "dometo, antaŭ la franca milito", ke li estis arestita kaj nun atendas en montpelliera koncentrejo, antaŭ ol oni sendu lin en Germanion.

Tuj, Dolores kun ŝia filineto Fifi, entrajniĝis ĝis tiu timinda koncentrejo; al la germana gardo-staranto, ŝi diris, ke ŝia edzo estas tie kaj ŝi dezirus vidi lin. Nekredeble, sed ŝi povis eniri!! Kiam ŝi trovis Gregorio-n, ŝi klarigis al li kion ŝi antaŭplanis: ŝi kaj li, brak-en-brake, la maneto de Fifi, en lia mano, ŝajne trankvile, ili paŝis ĝis la gardo-staranto, kiu? Strange rigardis aliflanke kaj jen ili denove entrajniĝis al Cournonterral. Tuj en la domo, ŝi kaŝis Gregorio-n en eta subtegmento. Dum la vespermanĝo, du soldatoj frapegis ĉe la pordo, dirante, ke ili aŭdis pri hispana viro, kiu sin kaŝas en tiu domo. Dolores, trankvile, parolante la francan tiel malbone kiel la soldatoj, klarigis, ke ŝi, ne konas iun ajn junulon, "vi povas rigardi ĉie en la domo, se ili volas", ŝi montris la ŝtuparon: "iru, ne ĝenu vin, mi loĝas tie, sola kun mia filineto".

Ŝi, tiel memcerta aspektis, ke la soldatoj, jam la mano sur la balustrado, por supreniri, foriris grumblante pro tiuj aĉaj denuncantoj, kiuj devus okupiĝi pri siaj propraj aferoj.

Malgraŭ sia ŝajna malstreĉiteco, Dolores, certe, suspiris, kiam ŝi fermis la pordon!

Dum la nokto, amikoj el la Makiso, venis serĉi Gregorio-n kaj li restis kun ili ĝis la fino de la milito.

Iun matenon, sur la ĉefa strato de Cournonterral, oni vidis longan vicon da tankoj, ĉevaloj kaj soldatoj, malrapidege kiel formikoj, ili lasis malantaŭ si, la vilaĝon kaj tuj, ĉiu komprenis, ke la fino de la milito estas TIE, sed neniu manifestis sian ĝojon, sian feliĉon, tiel neantaŭvidita estis tiu foriro.

Nur la morgaŭon, ĝojon oni vidis sur la stratoj sed ankaŭ hato (haine) kontraŭ milicanoj, kiuj kunlaboris dum la milito, kun la germanoj : el Makiso, veturis makisanoj kun brakbendoj, kie oni legis : F.F.I. Multaj infanoj sekvis tiun veturilegon, kien oni enmetis la

kunlaborantojn, por konduki ilin en stabejon, (quartier-général).

Oni devas diri, ke la F. F. I. anoj, kekfoje troigis kaj oni parolis pri juna milicisto kiun oni mortpafis sen juĝo.

Por la Hispanoj ankaŭ estis ĝoja liberigo ; finfine, ili povos vivi trankvile post tiom da longaj jaroj en la arbaroj, dormante en lignaj kabanjoj, kiel prauloj.

Rilate Vicente-Ramon, la vizito kun la ŝafo, estis fruktodona kaj kelkajn monatojn post lia reveno de la Makiso, Dolores naskis knabeton, kiu bedaŭrinde, ne sukcesis enspirisian unuan spiron da vivo (pro la kuracisto, kiu malrapide kaj kolera pro nokta ellitiĝo), alvenis malfrue. Li nur per forcepsoj helpis la bebon veni en bonan aeron, kiun bedaŭrinde li eĉ ne povis spiri, kelkajn minutojn antaŭ la alveno de la kuracisto, li MORTIS. Kompatindaj Dolores kaj Vicente-Ramon, la trian fojon, ili perdis infanon ! Tiom da doloroj por unu sola paro, por unu sola vivo, tio devus esti ne-permesata !

J.B.

* * * * *



Mediteranea Esperanto Semajno 2013

9-a Marto ĝis 16-a Marto 2013 Residence Val d'Esquière – Les Issambres-Francio - Lazura Marbordo

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro!!!

Aliĝkotizo: 60 eŭroj (familia aliĝkotizo: 100 eŭroj)

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphael, Francio rete: prezmoni@hotmail.com; tel. 0033 (0)4 94 83 06 88 aŭ'

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progres, FR 83600 Frejus, Tel. 0033(0)494956618 kris_grai@hotmail.fr

LE VIN COUP DE CŒUR

Espéranto

Midi Libre 19/07/2012

AOP Saint-Chinian Rouge 2010. Très jolie robe rouge grenat foncé avec quelques reflets bleutés. Le nez est d'une très grande finesse marqué par des arômes floraux (eucalyptus) et fruités (fruits rouges confits). L'attaque est fraîche et douce. Un vin harmonieux avec une très belle longueur. À passer en carafe. Accompagnement: canard rôti. Vente au caveau. Prix public conseillé: 7 €.

Domaine La Croix
Sainte-Eulalie, hameau de Combejean, 17 et 19 avenue de Saint-Chinian.
Tél. 0467380851 - croix-sainte-eulalie@neuf.fr



**Kalendareto
2013**

Pech Maho : opidumo en Suda Gaŭlio (dua parto)

Iajn spurojn de ili oni havas ĉie: lingvajn, etnonomajn kaj arkeologiajn: en la regiono oni trovis tre multajn kaj diversajn objektojn precipe en la multnombraj opidumoj. Koncerne la mediteranean bordon de Gaŭlio ĝiajn loĝantojn oni nomis Liguroj kaj ŝajnas ke ili estis miksaĵo de antikvaj antaŭkeltaj popoloj kaj de

keltaj. La nomo "Elisikoj" aperas nur en tri antikvaj historiaj dokumentoj: temas pri potenca organizita popolo, kiu loĝis ĉirkaŭ Narbono 6 ĝis 4 jarcentojn antaŭ nia erao. La regiono estis ankaŭ tuŝita de ibera kulturo, kiu etendiĝis ĉe Mediteraneo de la nuna Andaluzio ĝis Rodano. Oni trovis multajn skribaĵojn en la ibera lingvo, kiujn oni kapablas legi,

kvankam la lingvo ne ankoraŭ estas komprenata. Helenoj (Fokeanoj) kreis komercajn havenojn el kiuj plej gravaj estis Marsejlo (*Massalia*), Agdo (*Agathè*) kaj Ampurio. Kiam Marsejlo sendependiĝis de la Helenoj, ĝi superregis la komercon de la regiono sur la marbordo ĝis rivero Herault: transe regis Iberoj. La regiono estis tuŝita de la punikaj militoj inter Romio kaj Punikoj. Anibalo trovis en la regiono aliancantojn, kiuj pace lasis lian armeon trapasi dum ĝia vojaĝo de Iberio al Italio.

Ĉirkaŭ la jaro 200 antaŭ nia erao Romianoj supervenkis la Punikojn kaj milite ekposedis la regionon, punante la venkintojn pro sia alianco kun la Punikoj. En tiu sama tempo aperis Volkoj, kelta popolo eble kiel dungsoldatoj de la Punikoj. Romianoj establis militan politikan kaj komercan regadon kun ĉefurbo en Narbono. La narbona Provinco

apartenis al romia imperio 150 jarojn antaŭ la konkero de la cetero de Gaŭlio: pro tio ankaŭ ĝi estis pli "romanigita".

La regiono, estinte ero de la romia Imperio ĝis ties disfalo, fariĝis posedaĵo de la Visigotoj. Sidonio Apolinara nomis "Septimanio" tiun eksan parton de Gaŭlio, kiu apartenis al la visigota reĝlando ĝis arababerbera konkero en 714. En Septimanio rifuĝis la ariana herezio kaj Judoj fuĝantaj katolikajn persekutojn. Maŭroj posedis la regionon dum mallonga tempo (721-759) ĝis konkeris ĝin, Karlo la Granda. Post la disfalo de ties reĝlando Okcitanio esti regata de pluraj grafoj : de Akvitanio, de Tuluzo, de Provenco kaj de Katalunio.

Sekvota...

Arno Lagrange
(el www.teleskopo.com)



Esplorataj arkeologiaj lokoj



La Romia Narbona Provinco

La 98-a Universala Kongreso de Esperanto 20 julio – 27 julio 2013, Rejkjaviko - Islando

Rejkjaviko situas ĉe la sudokcidenta marbordo de Islando. Post kiam la monto Esja estis inkluzivita en la urban komunumon ĝi streĉiĝas 914 metrojn super la marnivelo.

Rejkjaviko estas la ĉefurbo de Islando, loĝloko de preskaŭ duono de la islanda popolo. Ĝia historio komenciĝas samtempe kun la historio de Islando, ĉar tie estis la bieno de la unua ekloĝanto, Ingolfur Arnarson. Verŝajne li donis al la loko la nomon Rejkjaviko, kio signifas “vaporgolfeto”, pro la varmaj fontoj kiuj nun hejtas la domojn tie.

Historio / Popolo

La historio de Islando estas sufiĉe mallonga: Ingolfur Arnarson, la unua daŭra enmigrinto, ekloĝis tie ĉ. 870. Tiam la enmigrantoj estis plejparte norvegaj bienistoj kaj nobeloj, kiuj fuĝis de Norvegio pro la superregado de ĝia reĝo, Haraldur la Belhara. En Islando ekloĝis ankaŭ keltoj el la Britaj Insuloj; tion oni povas konstati hodiaŭ en la DNA de la islandanoj. La leĝasembleo *Altingi* estis fondita en 930. Oni konsideras ĝin la plej malnova ankoraŭ funkcianta parlamento de la mondo. Islando fariĝis parto de la norvega regno en 1262 kaj poste de Danio. Ĝi fariĝis sendependa respubliko en 1944. Hodiaŭ ĝi havas proksimume 320 mil loĝantojn, kaj la islandanoj estas

fieraj pri siaj lingvo, literaturo kaj historio.

Klimato kaj geologio

Kaŭze de la Golfa Marfluo la klimato en Islando estas pli varma ol la norda latitudo povas supozebligi, kun Rejkjavika julia meztemperaturo de 13 °C.

Islando estas geologie nova, kaj troviĝas sur la limo de la du tektonikaj platoj kiuj apartigas Amerikon kaj Eŭropon. Pro tio abundas tie varmegaj fontoj, kaj oftas vulkanaj erupcioj – kiel la erupcio de Eyjafjallajokull en 2010, kiu fame kaosis internacian flugtrafikon.

Sekvota...



**UK 2014 - 99-a Universala
Kongreso de Esperanto,
Bonaero – Argentino**